Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
**La 5-a Virtuala Kongreso de Esperanto • 28 novembro – 1 decembro**

# La Flamo de Esperanto

**28-a de novembro 2024, numero 2**
Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## Malfermo de la 5-a Virtuala Kongreso de Esperanto

La centra aranĝo de la hodiaŭa tago estis Malfermo de la 5-a VK. Post salutaj vortoj de Vic-prezidanto de UEA Fernando Maia, sur la ekranoj aperis la Prezidanto de UEA Duncan Charters en nokta duonmallumo: ĉe li estis frua mateno kaj dume ne aŭroris. Certe tiu fakto ne estas nepre menciinda, sed ĝi estis etosa. Ni povis ne nur scii, sed ankaŭ vidi, kiel la kongreso kunigas en reala tempo homojn el diversaj anguloj de la mondo, ni ĉiuj samtempe spektas la Malfermon, kaj ĉe iu el ni meznoktas, ĉe iu tagmezas, iuj estas varme vestitaj eĉ hejme, kaj ĉe aliaj eĉ trans la ekrano senteblas varmeco, fluganta el la strato.

La Prezidanto iomete parolis pri Universalaj Kongresoj, pasinta kaj estonta, kaj pri vizitindaj eventoj dum la VK. Lian salutvorton vi povos legi sur la sekva paĝo.

Fernando Maia komencis sian paroladon de la sukcesa kongreso en Aruŝo (kies filmitajn prelegojn, ekzemple, sciencajn, vi povas spekti dum la VK). Poste sekvis iom nostalgia retrospektivo de la Virtualaj Kongresoj, naskiĝintaj dum pandemio, kiu vundis la tutan mondon kaj kiu por du jaroj forprenis de ni eblon renkontiĝi reale. Du unuaj Virtualaj Kongresoj anstataŭigis




du realajn, sed poste venis decido, ke ili kunekzistu, ĉar VK montriĝis ne nur renkontiĝo, kiu anstataŭigas la realajn, sed kiel aparta evento, kiu interalie donas eblon viziti Esperantujon al homoj, kiuj pro diversaj kialoj ne povas fari tion ekster la reto. Do, nun la VK iĝis tradicia ĉiujara aranĝo, kiu heredas sian ĉefan temon de la UK, do la temo iĝas ne nur kongresa, sed tutjara. Poste Fernando rakontis pri la emblemo de la 5-a VK (detalojn pri tio vd. sur p. 4).

Fernando memorigis, ke por nuna Estrara teamo tiu VK estas la lasta. Sekvas la jaro de ŝanĝoj, kaj UEA atendas freŝajn fortojn kaj kunlaboron. Parolante pri la nuna Estraro, Fernando aparte dankis Jérémie Sabiyumva, unuan dum longa tempo estraranon el Afriko. Ankaŭ Fernando menciis, ke li tre fieras vidi en la Estraro de UEA du virinojn: Gong Xiaofeng kaj Aurora Bute.




Fernando dankis ĉiujn kunlaborantojn de UEA: Espeanto-organizojn, asociojn, eldonejojn. UEA feliĉe ne estas sola en la mondo, kaj tre bezonas subtenon, reton por kreskigi kunlaboron por nia movado.

Post tio la partoprenantojn salutis Peter Baláž. Li unuavice rakontis pri la platformo de la kongreso kaj specifaĵoj de ĝia uzado. Vi daŭre povas trovi ĉiujn konsilojn en la sekcio "Instrukcio" de la maldekstra menuo. Li ankaŭ memorigis pri tio, ke senpaŭze dum la tuta kongreso funkcias du babilejoj "Koridoro" kaj "Kafejo", kie vi povas plani renkontiĝeton, aŭ subite renkonti iun homon, kiu deziras babili. Aparte la babilejoj utilos se dum iu prelego ne sufiĉis tempo por diskuto – ĝin eblas daŭrigi en la "koridoro". Same kiel

la tuta platformo, kie vi povos re-spekti multajn registritajn prelegojn, la babilejoj funkcios ne nur dum la VK, sed ankaŭ poste, do vi estas bonvenaj renkontiĝi tie.




La Malfermon kronis amuza kaj kortuŝa filmeto pri Tanzania kongreso, farita de So Jinsu, invito partopreni venontjaran kongreson en Brno (Burno) kaj certe, la Himno.





**Vi povas esti aŭtoro de *La Flamo de Esperanto*!**
**Por kontribui, skribu al la redakcio**
revuo.esperanto@gmail.com

# Salutmesaĝo por la 5-a Virtuala Kongreso

★ Duncan Charters,
la Prezidanto de UEA

Saluton, karaj membroj de UEA kaj estimataj gastoj! Kiel ĉiam, estas granda plezuro por mi bonvenigi vin, ĉi-foje al la 5-a Virtuala Kongreso de UEA. Kiel kutime, vi havos la okazon spekti plurajn prezentaĵojn de la Universala Kongreso en Aruŝo, Tanzanio, se vi ne povis ĉeesti, inkluzive tre interesajn prelegojn de la Internacia Kongresa Universitato, sed plejparte la nuna materialo estas freŝa aldono por nia pripensado kaj ĝuo – jes arto!: literaturo kaj muziko, kiel ni ĉiuj atendas. La Estraro de UEA atentigas pri la eblo fari al ni demandojn en "UEA respondas", kaj mi mem kiel kutime ĝisdatigos pri la Strategia Laborplanado kaj ankaŭ pri la progreso kiun ni faris pri la ĉi-jara temo de Interkultura Kompetento. La alia grava temo estas Virina Agado, kaj ankaŭ por tio estos speciala sesio gvidata de membroj de nia Virina Komisiono. Kaj ne forgesu ke la ĉefaj prezentadoj restos ĝis la jarfino se vi ne povos tuj spekti ĉion kion vi deziras.




Ni atingis multon ĉi-jare, sed la venonta jaro estos jaro de ŝanĝoj por ebligi pli da progreso. Ni atendas freŝajn fortojn de vi por nia Estraro, nia Komitato, kaj la laborgrupoj kiuj plene organiziĝos dum la nova jaro. Kvankam ni havas kaj havos venontjare stabilan Libroservon kaj Financan Fakon, ni laboros pri la necesaj ŝanĝoj por tiuj, la Centra Oficejo, nia administrado, niaj servoj al membroj, kaj niaj retejoj kaj komunika strategio. Defia kaj tamen ĝoja tasko, ĉar ni celas pli bone servi niajn membrojn kaj la mondon kiu bezonas scii pri nia lingvo kaj nia agado, kaj nin atentas ĉiam pli serioze.

Do ĝuu nian Virtualan Kongreson, kaj se eblos al vi venontjare partopreni la Universala Kongreson en Brno (Burno), ni ĝojos vin vidi en la momento de transiro al nova laborperiodo!

# Esti virino. Pri la prelego de Mireille Grosjean

Anna Striganova

Mi rerakontu unu pecon de la prelego, kiu bone ilustras ĝian sencon.


Du viroj, patro kaj filo, veturas per aŭto, filo stiras. Subite filo perdas kontrolon, okazas akcidento, filo pereas, patro trafas malsanulejon kaj provante kompreni, kio okazis kun filo, kial li perdis kontrolon, li petas fari nekropsion. Post iom da tempo venas respondo de la kuracisto pri nekropsio: “mi ne povas fari tion, ĉar pereinto estas mia filo”.

Paŭzo.

Pri kio vi pensis unuavice? Ke filo estas adoptita kaj havis alian laŭsangan patron? Eble ĉi-foje vi donis ne tiun respondon, sed la korektan, ĉar vi vidas nomon de la prelego, sed en alia situacio, pri kio vi pensus unuavice?

Certe, kuracisto estis virino. Mireille iom antaŭe diris, ke kiam ŝi instruas Esperanton, ŝi preferas, ke gelernantoj uzu sufikson -in-, kiam ili parolas pri profesiulinoj, diru “kuracistino” anstataŭ “kuracisto”. Sed ja temas ne pri nomado, ne pri sufiksoj, ĉu?

Al mi tre plaĉis, ke la prelego de Mireille estis tre mola, plena da estimo kaj komprenemo pri tio, ke ekzistas multaj diversaj kulturoj, filozofioj, religioj, ke ni vivas en mondo, kiu estas malsama. “Kiam mi vizitis Iranon, – ŝi diris, – Mi surhavis vualon, kiam mi vizitis Japanion, mi demetis ŝuojn, enirante domon, sed tamen estas aliaj aĵoj, kiujn mi ne pretas akcepti”.




Aparte plaĉas al mi la konkludo: “Estimo estas la bazo de ĉio”. Mi rememoris kun plezuro *Magian Monton* de T. Mann, kie granda parto estas dediĉita al tiu ideo. Ke nur per nia kapablo estimi unu la alian, rideti, saluti, resti afablaj malgraŭ nia humoro, malgraŭ ĉiuj problemoj, – ni kontraŭstaras mem morton, ni subtenas unu en la alia foje perdiĝantan kapablon vivi en mondo, kie ni ĉiuj estas karnuloj, do iam mortos.

Entute la prelego estas iom fragmenteca, diversaj pecoj, bildoj, ilustrantaj virinajn fortojn, malfortojn, defiojn – interplektiĝis kaj kreis ion diafanan, sed ege pensigan. La prelego komenciĝis de vortoj, kiel 78 jarojn antaŭe ĉe la prelegantino naskiĝis ina bebo, do jam komenco sonis iom fabelece, kiel ponto inter mondoj kaj tempoj. La historioj el kiuj plektiĝis la prelego estis tute diversaj, ek de rakontoj pri la landoj, kie ĝis nun laŭleĝe eblas mortigi edzinon, ĝis kortuŝe fiera rakonto pri momento, kiam Mireille unuafoje en la vivo voĉdonis (rajto voĉdoni por virinoj venis al Svislando, de kie ŝi devenas, malfrue). Ŝi rakontis pri afrikaj virinoj, kiujn ŝi instruis dum ŝiaj afrikaj kursoj, rakontis pri virinoj ĉe UN, kaj pri tio ke dum seriozaj renkontiĝoj ŝi vidas tre grandan malsamon inter renkontiĝoj pure virinaj kaj miksitaj. Dum la unuaj virinoj aktive komunikas, dum la duaj tre ofte silentas. Ŝi ne analizas tion, tre plaĉis al mi, ke la devon analizi ŝi lasas por ni. Sed antaŭ dek minutoj ŝi rakontis pri “kavernaj tempoj”, kiam, virino subtenis fajron en la kaverno kaj viro staris ekstere, defendante. Ni pli kutimas, ke viro staru ekstere, ke li okupiĝu pri eksteraj rilatoj. Sed de alia flanko (sekva historieto), virino nature havas komunikajn kapablojn, nur ŝi povas interkonsenti kun infaneto, kiu al demando: “Ĉu vi volas sukon poman aŭ oranĝan?” respondas “Jes!”. Sekvis multaj historietoj, teruraj, aŭ male amuzaj. Mian atenton kaptis unu. Kiam Mireille vizitis Japanion, ŝi lernis pri batalarto, kaj unu el partoprenantinoj havis doloron en dorso. Instruisto komence mem volis masaĝi la dorson, sed poste petis Mireille, ĉar ŝi estas virino, do ŝiaj manoj havos pli da kuraciga forto. Estis tiel strange renkonti tian historion dum prelego lime serioza kaj realeca. Sed tuj mi rememoris unu el miaj ŝatataj libroj (interalie ĝuste pri virinoj, pri ilia forto kaj unika rolo ekde pratempoj), *Ĝis kiam ni ekhavis vizaĝojn* (*Till We Have Faces*) de C. S. Lewis. Estis tie unu tre klera doktoro, kiu ege malestimis ĉion, kion ne eblas klarigi science, li ĉiam diris: “Mi ne interesiĝas pri ĉio, kio ne estas absolute efektiva aĵo”. Kiam oni demandis lin pri unu knabino, kiu estis tiom milde bonkora, ke homoj kredis, ke sola ŝia tuŝo povas kuraci, li respondis “Tiu fakto, ke manoj de certaj homoj kuracas, estas absolute efektiva aĵo!”. Interalie Mireille ankaŭ nomis bonkorecon unu el la plej ĉefaj trajtoj por virino.

La fragmenteca kaj pensiga estis la prelego. Same fragmenteca estas mia artikolo. Se vi ŝatus profundiĝi en la temon, vizitu **ViMF: Virina Agado** 30-an de novembro je la 09.00 UTC.

# BET en 2025 okazos en Kaunas! Bonvenon !

★ Povilas Jegorovas,
Prezidanto de Litova Esperanto-Asocio
Prezidanto de la Organiza Komitato de BET-59

La tradiciaj 59-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj en 2025 denove okazos en Litovio. Ĉi-foje BET-59 okazos en la dua laŭ grandeco urbo de Litovio Kaunas la 5-13-an de julio, 2025.

BET-oj estas organizataj ekde 1959 laŭvice en Latvio, Estonio kaj Litovio.

BET-59 funkcios en la Universitato Vytautas La Granda (str. Daukanto 28). Kaunas estas konsiderata ĉefurbo de Esperanto en Litovio, ĉar en Kaunas ĉiam funkciis kaj funkcias ankaŭ nun sidejo de Litova Esperanto-Asocio. Diversaj informoj pri la urbo estas troveblaj ĉi-tie: https://visit.kaunas.lt/en/.

Organizantoj de BET-59 ĉi-foje estas ne nur Litova Esperanto-Asocio, sed ankaŭ Universitato Vytautas La Granda kaj Monda Centro de Litovoj. Tion antaŭvidas fine de 2023 subskribita kunlabora kontrakto inter Litova Esperanto-Asocio kaj la Universitato. Litovan Esperanto-Asocion kun la Monda Centro de Litovoj ligas multjara kaj fruktodona kunlaboro.

Same kiel kelkaj antaŭaj Litoviaj BET-oj, ankaŭ tiu en 2025, okazos sub aŭspicio de UEA.

Esperantistoj havos tre luksajn kondiĉojn por laboro kaj ripozo. Ni povos senlimige uzi la tutan infrastrukturon de la universitato (kunsidejoj, salonoj, aŭditorioj, studentaj domoj, universitata kafejo, komputiloj, alia organiza tekniko ktp.).

Organizantoj proponos al la partoprenantoj de BET-59 vastan gamon de loĝeblecoj – ekde simplaj nemultekostaj studentaj domoj ĝis la kvarstelaj hoteloj.

Manĝado ankaŭ estos organizita.

BET-59 havas ĉiuspecan subtenon kaj helpon de la urbaj instancoj de Kaunas kaj de la tutlandaj ŝtataj instancoj.

Ni organizos vere altnivelan internacian esperantistan aranĝon kaj organize kaj programe.

La programo kiel kutime dum BET-oj estos tre varia kaj interesa.

Litovaj esperantistoj faros ĉion eblan por kontentigi ĉies dezirojn kaj gustojn.

Ni atendas ĝis 500 gastojn el 30-40 landoj. La kvanto de partoprenantoj ne estas limigita.

Jam aperis la unua Informilo pri BET-59: *https://sezonoj.ru/2024/07/bet-146/*, kie Vi trovos ĉiujn bezonatajn detalojn pri la aranĝo.

Jam nun eblas aliĝi al BET-59. Detaloj estas en la unua Informilo.

**Bonvenon al Litovio! Bonvenon al BET-59!**

La emblemo de la 5-a VK fariĝas la definitiva oficiala emblemo de la VK. Ĝin kreis Toni Espinosa Largo (el Hispanio). La emblemo revokas en nian memoron la emblemojn de ĉiuj antaŭaj eldonoj de la VK. Ĝi sugestas flaman formon, kiu dinamike envolviĝas por reflekti la varmon, pasion kaj daŭran vivforton de la Esperanta komunumo. Ĝi uzas la kernajn primarajn kolorojn (ruĝa, flava kaj blua), kiuj interplektiĝas por krei verdan, oranĝan kaj nigran kolorojn, ankaŭ ĉeestajn en la emblemo de UEA. Tiuj koloroj ne nur estetike kunfandiĝas, sed ankaŭ simbolas unuecon en diverseco. La verda stelo, kiu prezidas la bildon, reprezentas Esperanton kaj la esperon. Ĝi kompletigas tiun desegnan kompozicion, reliefigante la blankan fonon, kiu elvokas la ideon de paco kaj de senfina spaco por daŭra kreemo kaj agado.